SYLLA CHAVES magistriĝis pri komunikado en Stanford (Usono) kaj ankaŭ studis juron en Rio-de-Janejro, kibernetikan pedagogion en Paderborn (Germanio) kaj politikan sciencon en Parizo. Li plurjare estis oficisto de UN, en Novjorko, kaj de Unesko, en Parizo. Lia ĉefa ne-esperanta laboro ekde tiam estas, kiel universitata profesoro pri komunikado, en Rio-de-Janejro. Li tre multe verkas en Esperanto, precipe depost 1980. Li ricevis premiojn en belartaj konkursoj de UEA, kaj verkoj liaj aperas en Esperantaj antologioj. Liaj lastaj libroj, diskoj kaj sonbendoj destiniĝas precipe al la granda publiko, kiu lernas sole aŭ kiu serĉas perfektiĝon en nia internacia lingvo. Li estas membro de la AKADEMIO INTERNACIA DE LA SCIENCOJ kaj de la AKADEMIO DE ESPERANTO. En 1991 li ricevis la premion ONISABURO DEGUĈI pro la valora enhavo de liaj verkoj, kiuj, sekvante la vojon indikitan de Zamenhof, multe kontribuas por monda paco kaj interpopola solidareco.

★

Jen ORIGINALA ESPERANTA BILDVORTARO, aranĝita laŭ la specifaj uzoj kaj bezonoj de nia internacia samideanaro. En ĝi estas 92 bildpaĝoj, kun preskaŭ 3000 bildigitaj vortoj, facile troveblaj pere de du gravaj helpiloj:

1 ALFABETA VORTLISTO; kaj
2 LAŬTEMA VORTLISTO.

La homa korpo, vestaĵoj, bestoj, plantoj, manĝaĵoj, hejmaj objektoj, ludoj, sportoj, muziko kaj pluraj aliaj temoj estas ĉi tie abunde kaj varie priskribitaj per klaraj bildoj, sen naciaj tendencoj en ilia elekto. Eĉ en la en-bildaj tekstoj klare vidiĝas, ke ni estas fakte en Esperantujo. Kaj aldone, prezentiĝas ok paĝoj da gravaj vortlistoj, kiel ekzemple la Esperantaj korelativoj kaj nombra sistemo, kaj plurlandaj moneroj kaj mezurunuoj.

Ekvilibra pligrandigo de la uzenda vortprovizo estas unu el la ĉefaj celoj de ĉi tiu libro, speciale taŭga por lernantoj kaj komencantaj verkistoj. Sinonimoj ĉi tie aperas abunde, kun indiko pri oficialeco kaj uzateco.

Tre malofte, en iu ajn lingvo, troviĝas tiom da helpo por la vort-serĉanto en unu sola malgranda kaj ne teknika vortaro.

La eldoninto
ESPERANTO-ASOCIO DE SAN-PAŬLO

ORIGINALA
ESPERANTA

BILDVORTARO

BILDVORTARO



☆ SYLLA CHAVES

Kompostado, arta planado kaj muntado
Paŭlo Alves
Ney Antonio Jorge
Jane Lucas

Kovrilo kaj bildoj
Karlo Teodoro

© Kopirajto: Sylla Chaves, 1991

Eldonita de

ESPERANTO-ASOCIO DE SAN-PAŬLO
(Associação Paulista de Esperanto)
★
Rua Fáustolo 124 - Água Branca
05041 - São Paulo - SP

TELEFONO: (011) 62-1183 (BRAZILO)

ANTAŬ-PAROLO

Jam de multaj jaroj ni komputile preparas Esperantan Vortaron, kiun ni decidis nomi **PRAKTIKA VORTARETO DE ESPERANTO** (*PraV*). Ni elektis la nomon VORTARETO ne nur por distingi ĝin de PIV kaj aliaj grandaj vortaroj, sed ankaŭ por emfaze montri, ke, en nia internacia lingvo, vortaro povas esti sam-tempe malgranda kaj riĉ-enhava. Sufiĉas liberigi ĝin el balastaj teknikaĵoj, troaj neologismoj kaj komplikaj difinoj. En ĝi ne estos la fakaj terminoj, kiuj nun-tempe dis-divide multobligas en la naciaj lingvoj, fariĝante centoj da miloj. Ĝi tamen enhavos ĉiujn oficialajn radikojn kaj ankaŭ la ne oficialajn vortojn, kiuj pri-skribas nian ĉiu-tagan vivon kaj respondas al ĉiuj bezonoj de nia ne-teknika literaturo.

Fakte, *PraV* ne estos ekzakte unu vortareto, sed la kombino de pluraj. Nia komputila datumo havas informojn, kiuj permesas aranĝi la tuton divers-maniere. Tiel, laŭ nia plano, *PraV* konsistos el la jenaj sep partoj, kiujn la komputilo bone kun-ordigas:

UNUA VOLUMO — POR INTERNACIA UZO
1. ESPERANTA-ESPERANTA PARTO
2. LAŬ-TEMA PARTO
3. LAŬ-RIMA PARTO
4. BILDA KAJ MAPA PARTO

DUA VOLUMO — POR NACIA UZO
5. NACILINGVA GRAMATIKETO
6. ESPERANTA-NACILINGVA PARTO
7. NACILINGVA-ESPERANTA PARTO

Evidente, la naci-lingvo, pri kiu ni nun zorgas, estas la portugala. Ni tamen proponas, ke en aliaj landoj pretiĝu vortaretoj laŭ similaj bazoj. La elasta malgrandeco de la baza Esperanta vort-provizo estas eble la ĉefa atuto de nia lingvo en la batalo por tut-mondeco. La kuna uzo de nia planita tutaĵo estos certe PRAKTIKA, precipe por tiuj, kiuj volas, krom legi, ankaŭ verki kaj prelegi.

PraV jam estas sur-voje. Sed ĝia fin-pretigo estos multe pli laboriga ol ni antaŭe supozis, ĉefe pro la bezono konsulti vortaristojn el aliaj partoj de la mondo. Pro tiu malfruo, ni decidis tuj eldoni tion, kio jam estis preta: la bilda parto. Ni nomis ĝin ORIGINALA ESPERANTA BILDVORTARO (*OEB*), kaj aperigas ĝin, kiel mem-staran verkon. Eble la aliaj partoj de *PraV* sekvos ĝin ankaŭ mem-stare, unu post la alia.

★ ★ ★

OEB estis aranĝita laŭ la specifaj uzoj kaj bezonoj de nia internacia sàmideanaro. Ĝi nomiĝas ORIGINALA por diferenciĝi el la tradukoj (cetere tre bonaj) haveblaj en Esperantujo, kiel **ESPERANTO PER INSTRUAJ BILDOJ**, de Thora Goldschmidt (el la franca), **PRAKTIKA BILDVORTARO DE ESPERANTO**, de la Oksforda Universitato (el la angla), kaj **ESPERANTA BILDVORTARO**, la Esperanta Duden (el la germana). La originala

esperanteco de *OEB* evidentiĝas, inter-alie, en la gramatika parto (bild-paĝoj 1 ĝis 20) kaj en la en-bildaj tekstoj (bild-paĝoj 70-71).

En *OEB* estas 92 bild-paĝoj, kun preskaŭ 3000 bildigitaj vortoj, facile troveblaj pere de du gravaj helpiloj: 1. ALFABETA VORT-LISTO; kaj 2. LAŬ-TEMA VORT-LISTO.

En la bild-paĝoj, ĉiuj vortoj aperas uniforme skribitaj per majuskloj, sed en la du suplementaj vort-listoj ili aperas malsame, klasigitaj en tri kategorioj:

1. **OFICIALAJ KAJ BAZAJ** vortoj, tio estas, el la BAZA RADIKARO OFICIALA de la Akademio de Esperanto (BRO). Tiuj vortoj aperas en la suplementaj vort-listoj skribitaj nur per majuskloj: **FLORO, HOMO, MANO** ktp.

2. **OFICIALAJ, SED NE BAZAJ** vortoj aperas en tiuj listoj kun majusklaj komenc-literoj: **Atleto, Fluto, Papavo** ktp.

3. **NE OFICIALAJ** vortoj estas tie skribitaj per minuskloj: **avokado, saksofono, teniso** ktp.

★ ★ ★

Nian vort- kaj bild-elekton gvidis la antaŭ-decidoj, ke **EN OEB ESTU, KIEL EBLE PLEJ MULTE:**

1. **OFICIALAJ VORTOJ, PRECIPE BAZAJ.** Tial, elprenite el BRO, aperas ĉi tie eĉ **BASKOJ, FRAKO** kaj **VEŜTO**, tre malofte uzataj nun; kaj ankaŭ **EZOKOJ** kaj **GOBIOJ**, river-fiŝoj tute ne-konataj en sudaj landoj. Eble la vort-provizo el BRO fariĝas malaktuala, kaj ankaŭ eble ĝi estas tro eŭropeca. Sed niaj decidoj 2 kaj 3 (ĉi-sube) sufiĉe kontraŭ-staras tiujn du tendencojn.

2. **VORTOJ, KIUJ PRI-SKRIBAS LA NUNAN MONDAN REALON.** Ĉi tie ni movis la balancilon en la kontraŭan direkton. Kaj la deir-punkto ĉi-rilate ne estis la Esperantaj vortaroj kaj vort-listoj, sed la nuna monda realo, **spegulata en la nacia gazetaro.** Tiu-cele helpis nin ankaŭ ne-esperantistoj. Tial estas ĉi tie pluraj gravaj ne-oficialaj vortoj, kiel: **giĉeto, ĝinzo, mortadelo, pico, piĵamo, platformo, salamo, taksio** ktp.

3. **VORTOJ PRI EKSTER-EŬROPAJ REALAĴOJ**, kiuj helpas la tut-mondiĝon de la Esperanta vort-provizo: **kecalo, kimono, kivio, liĉio, papajo, piranjo, ponĉo, sario, tapiro, tukano** ktp. Tiu-cele, ni aldonis vortojn ne troveblajn en PIV kaj DUDEN, indikante tion per *, kaj klarigis ilin en la glosaro: **ĉajoto*, ĉurasko*, fornario*, zonotriko*** ktp. Evidente la pli-multo el la aldonitaj vortoj rilatas al realo ĉirkaŭ la aŭtoro, en lia parto de la mondo. Spertuloj bon-volu proponi aldonojn el aliaj mond-partoj, por eventuala dua eldono.

4. **KUN-METAĴOJ**, kiuj riĉigas la lingvon sen tro-ŝarĝo de la memoro: **ĴET-KUBO, LUL-SEĜO, LUM-TURO, POŜ-LAMPO, SUKER-POMO** ktp. Ankaŭ ĉi-rilate ni proponis aldonojn, kun la samaj indikoj kaj klarigoj supre indikitaj: **KRI-APOGANTOJ*, KROM-KARTO*, PASI-FRUKTO*, TALI-RINGO*** ktp.

5. **SINONIMOJ**, precipe tiuj, kiuj klare montras la du ĉefajn vojojn de nia lingvo-evoluo: neologismoj kaj kun-metaĵoj. Malmultajn proponojn ni faris ĉi tie, sed inter ili estas ankaŭ paroj de sinonimoj: **berimbao* = MUZIK-ARKO*, kuiko* = FROT-TAMBURO***. Sinonimecon ni ĉi tie indikis per = , eĉ kie la sinonimoj ne estas perfektaj, kaj eĉ kie ili estas interŝanĝeblaj nur en la speciala situacio de la bildo, kiel ekzemple: **adolto = PLEN-AĜULO = PLEN-KRESKULO, LONGA FINGRO = MEZA FINGRO, KOMERCISTO = VENDISTO, PRINCO = REĜIDO, ESPLORISTO = MOND-VOJAĜANTO** ktp.

6. **INDIKOJ PRI SUPER-FLUAJ VORT-ELEMENTOJ**, eĉ se gramatike taŭgaj. Tiun super-fluecon ni montras ĉi tie per parentezo: **AKV(UM)I, FIŜ(KAPT)ADO, PIED-PILK(AD)O** indikas, ke **AKVI = AKVUMI, FIŜADO = FIŜ-KAPTADO** ktp. Certe **ludi piedpilkon, akvi planton** kaj **malpermesi fiŝadon** estas diraĵoj klaraj kaj malpezaj, kaj konsekvence bon-stilaj. Tamen atentu, ke nia parentezo povas ankaŭ signifi aperon de ambaŭ vortoj kaj realaĵoj en niaj bildoj. Tiel, la skribo **KNAB(IN)O** indikas, tute malsame al la antaŭaj ekzemploj, ke en la bildoj estas kaj **KNABO** kaj **KNABINO.**

7. **EBLECOJ PAROLI PLI ĜENERALE AŬ PLI SPECIFE.** Ĉi tie ni indikis tion per du punktoj. **OVAĴO: FRITITA OVO; SKRIBILO: FONTO-PLUMO; SKRIBAĴO: LETERO; SUB-VESTO: KALSONO; UNIFORMO: SOLDATA; KAMELO: DU-ĜIBA.** Tio signifas, ke **FRITITA OVO** estas **OVAĴO** (sed ne ĉiuj **OVAĴOJ** estas **FRITITAJ OVOJ**); ke **FONTO-PLUMO** estas **SKRIBILO** (sed ne ĉiuj **SKRIBILOJ** estas **FONTO-PLUMOJ**); ke la bilda **UNIFORMO** estas **SOLDATA** (kvankam ankaŭ ekzistas aliaj **UNIFORMOJ**); ktp. La elekto dependus de okazaj bezonoj. Specifeco povas esti necesa: "ĉu vi trovis la krajonon, kiun mi perdis?" Sed, pli ofte, ĝeneraleco estas pli trafa: "mi urĝe bezonas skribilon por fari noteton."

★ ★ ★

Vortaristo ne devas trudi siajn preferojn. Li tamen devas kontribui por ke nia internacia lingvo restu ĉiam SIMPLA, BEL-SONA, FACILE LERNEBLA, kaj tamen HOMECE VIVANTA, kiel la originala kreaĵo de Zamenhof. Tiu-rilate, devas esti klaraj niaj plej gravaj star-punktoj:

1. En Esperanto estas, KAJ NE POVUS NE ESTI, perfektaj sinonimoj, kiel ekzemple **Leopardo = Pantero**. Tiuj du vortoj estas fundamentaj kaj kun-ekzistas en Esperanto, kiel en pluraj okcidentaj lingvoj. Ili tamen nomas unu solan beston: la afrika karno-manĝa *Felis pardus*. Por ni tio ne gravas. Kaj ankaŭ ne gravas, ke **plaĝo = strando** kaj **futbalo = PIED-PILK(AD)O** kun ekzakte la samaj signifoj. Nur gravas, ke perfektaj sinonimoj ne multobliĝu sen-mezure en nia lingvo, por ke ĝia baza vort-provizo restu malgranda. Ni devas konscii, ke lingvo estas nenies propraĵo. Aŭ, pli ĝuste, ke ĝi estas vivanta socia realaĵo. Nome de klareco, beleco, facileco, internacieco kaj logikeco ni povas kaj devas agi: per artikoloj, debatoj, voĉ-donoj, verkado kaj instruado. Sed ni ankaŭ devas lerni aŭskulti kaj kun-vivi kun la homa ne-perfektaĵo de nia mondo. Eĉ se tiu ne-perfektaĵo troviĝas en Esperanto. Zamenhof rifuzis esti ĉio-pova decidanto pri la lingvo de li kreita. Imitante tiun saĝan sin-tenon, ni devas ĉiam serĉi inter-konsenton. Nur tiel la kvanto de perfektaj sinonimoj restos malgranda, sen danĝero por la ekvilibra evoluo de nia lingvo.

2. En Esperanto ankaŭ estas ne-perfektaj sinonimoj. Ĉi tiuj estas tre utilaj, precipe kiam ili ne prezentas ŝarĝon por la memoro, kiel ekzemple: **ŜIPANO = MARISTO.** Ili inter-ŝanĝeble nomas la saman homon. Ili tamen faras tion malsame. Unu akcentas lian rilaton kun la ŝipo; la alia, lian rilaton kun la maro. Jen grava nuanco por la konsidero de verkistoj kaj prelegantoj.

3. Tiel, kiel unu sola realaĵo povas havi plurajn nomojn, ankaŭ unu sola vorto povas havi plurajn signifojn. En nia baza lingvo EL indikas materialon en **PORDO EL LIGNO** (bildo 6.27) kaj antaŭan lokon en **VERŜO EL LA GLASO** (18.16). Same **UJO** signifas arbeton en **ROZUJO** (39.e) kaj **BANANUJO** (12.16) kaj poteton en **SUKERUJO** (53.f). La fundamenta vorto **AĬGUSTO** estas nomo de monato kaj de viro. **KUBO** estas lando kaj geometria solido. Por ni tute ne gravas, ke **TRUNKO** estas homa (22) kaj arba (39.ĉ); ke **DENTO** estas homa (10.15), fiŝa (1.d) kaj kombila (8.24); ke **POŜO** estas beka (30.b), ventra (36.ĝ), mantela kaj pantalona (ambaŭ 24.17); aŭ ke **REĜO** kaj **SOLDATO** estas homoj (bild-paĝoj 7 kaj 24) kaj ŝak-pecoj (63). Inventi malsamajn vortojn por ĉiuj realaĵoj de la mondo, kiuj estas multaj milionoj, estus frenezaĵo, kiu detruus la simplecon de nia lingvo. En la lumo de tiuj konsideroj, ni klarigas du malsam-liniajn proponojn, kiujn ni faris ĉi tie:

a. La frukto *Averrhoa carambola* (41.17) prenus sian nomon el la origina maratha lingvo: **karambalo*** ; ĝi tiel distingiĝus de la ago Karambolo. Tiu diferencigo akompanas la similajn parojn, kiuj jam ekzistas en Esperanto, kiel ekzemple **KORO** kaj **Kero**. La unua estas organo de la homa korpo (22.1) aŭ parto de la interno de arboj (45.10). La dua estas lud-karta emblemo simila al la artista reprezento de la homa koro (63.13).

b. La birdo *Pitangus* (31.10) havus la latin-devenan nomon **pitango***, malgraŭ la sam-noma bero (43.14). Kiel dirite supre, ni opinias, ke tiu sam-nomeco ne estas ĝena. Ver-ŝajne ĉiuj komprenos, ke **pitanga SUKO** estas farita el bero, kaj ne el birdeto, same kiel ŝakisto damigas ŝak-pecon, kaj ne veran soldaton.

4. Same, kiel oni povas lasi, ke unu vorto havu du malsamajn signifojn, kiel ĉi-supre, kun pli da kialo, oni povas lasi, ke ĝi havu unu solan pli ampleksan signifon. Kial **ĝangalo** estus nur hinda arbaro, se similaj arbaroj ekzistas ankaŭ en aliaj kontinentoj? Kial **sputniko** (el la rusa: **satelito**, kaj ankaŭ **KUN-VOJAĜANTO**) estus nur artefarita satelito de la tero, kaj ne ankaŭ iu ajn satelito sendata de la homo por orbiti ĉirkaŭ alia planedo kaj fariĝi ties vojaĝ-kunulo? Tiaj arbitraj PIV-aj limigoj en la senco de vortoj estas ĝenaj kaj devigas la kreadon de aliaj vortoj, kiuj danĝere ampleksigas nian vort-provizon. Por eviti tion, ni, rilate al PIV, pli-larĝigis la signifojn de kelkaj vortoj, kiel ekzemple **GARAĜO** (59.26) kaj **Verando** (59.15).

★ ★ ★

Ekvilibra pli-grandigo de la uzenda vort-provizo estas unu el la ĉefaj celoj de ĉi tiu libro. Tial la homa korpo, vestaĵoj, bestoj, plantoj, manĝaĵoj, hejmaj objektoj, ludoj, sportoj, muziko kaj pluraj aliaj temoj estas ĉi tie abunde kaj varie pri-skribitaj per bildoj.

Niaj preskaŭ 3000 bildigitaj vortoj estas ĉi tie klasigitaj en pli ol 50 temoj kaj 200 sub-temoj. Ĉiu vorto estas trovebla en unu aŭ pliaj lokoj de la alfabeta listo; kaj la pli-multo, ankaŭ en la laŭ-tema listo. Jen du ekzemploj de vorto-serĉado en ĉi tiu vortaro:

Bas-BUTONOJ troveblas alfabete, en du lokoj: ĉe **Baso**, kune kun **Bas-Tamburo** kaj **Bas-TRUMPETO**; kaj ankaŭ ĉe **BUTONO**, kune kun **VESTAĴAJ** BUTONOJ kaj la ago **BUTON(UM)I**. En ambaŭ lokoj ĝia bild-numero estas indikita: 66.c; kaj ankaŭ la mallongigo de ĝia temo: **MUZIK.** En ties loko en la laŭ-tema listo (8.1) ĝi aperas en la sub-temo **PARTOJ DE MUZIKILOJ**, kune kun **Arĉo, balgo, BUŜ-PECO, Klavo, KORDO** kaj aliaj.

(MANĜ)BASTONETOJ troveblas alfabete, ankaŭ en du lokoj: ĉe **MANĜI**, kune kun **MANĜAĴO, MANĜO-ĈAMBRO, MANĜO-TABLO** kaj aliaj; kaj ĉe **BASTONO**, kune kun **GOLF-BASTONO, LAM-BASTONO, PAŜTISTA BASTONO, POLICA BASTONO** kaj aliaj. En ambaŭ lokoj ĝia bild-numero estas indikita: 50.3; kaj ankaŭ ĝia temo: **HEJM-K.** Kaj en ties loko (6.5) ĝi aperas en la sub-temo **MANĜILARO**, kune kun **FORKO, KULERO** kaj **TRANĈILO.**

Tiu mult-forma serĉebleco en malgranda kaj ne-teknika vortaro estas certe utila por tiuj, kiuj faras siajn unuajn paŝojn en verkado kaj prelegado.

Antaŭ sia perfektiĝo ili eble trovos malfacilon en la serĉado en PIV kaj DUDEN. Kaj en aliaj vortaroj ili eble ricevos tro malmulte da informoj. Ŝajne ĉi tie troviĝas la taŭga meza vojo.

★ ★ ★

Ni devas nun atentigi pri kelkaj aliaj aspektoj de ĉi tiu verko:

1. Bild-vortaro certe ne estas taŭga loko por serĉi ĝeneralaĵojn kaj abstraktaĵojn, kiel ekzemple **PACO, FIDELO, SINCERO** kaj **SIN-OFERO**. Tiuj vortoj ja estas gravaj kaj nepre aperos en *PraV*, ne nur en ĝia Esperanta-Esperanta parto, sed ankaŭ en la laŭ-tema, kiu estos multe pli vasta kaj varia ol la ĉi-tiea. Dume ni konsciu, ke bild-vortaro ne povas esti kompleta, eĉ kiam ĝia en-havo estas tre riĉa.

2. Streketoj estas ĉi tie abunde uzataj: **ENIR-PORDO, ENHAV-TABELO, PAN-FRUKTO, SUKER-POMO, SUN-SUBIRO** ktp. Neniu vorto havas ĉi tie pli ol unu streketo. Tamen ĉi tie estas multe pli da streketoj ol en la ĝenerala Esperanta literaturo. Tion ni imitis de akademiano Rüdiger Eichholz, en DUDEN, por faciligi la komprenon de ne-spertuloj. Kaj, kiel li, ni ankaŭ favorus pli oftan uzadon de tiaj streketoj, eĉ en ordinaraj tekstoj, kiel ĉi tiu antaŭ-parolo.

★ ★ ★

Ni kore dankas tiujn, kiuj helpis nian reviziadon per konsiloj kaj proponoj. Kun pardon-peto al tiuj, kiujn ni eble nun forgesas, ni ĉi tie registros la nomojn de akademianoj Bernard Golden, Leopoldo Knoedt, Li Shijun kaj Werner Bormann; kaj same ankaŭ tiujn de Alfredo Aragón (pri muziko), Aloísio Sartorato, Aylton Lima Rocha, Elvira Fontes, Helmuth Schenk, Jair Sales, Lawrence Mee kaj Mila v.d. Horst-Kolinska, kiuj ankaŭ tre alt-nivele helpis nin. Ni ankaŭ dankas la desegniston KARLO TEODORO, kiu ame kaj kreive bildigis tion, kion ni planis. Kaj plej kore al la kar-memora samideanino Audrey Childs-Mee, kies bon-vola antaŭ-recenzo en MONATO instigis nin al novaj pli-bonigoj en ĉi tiu verko.

Estis granda laboro nia-flanke, kaj responde venis multe da helpo el la supre menciitaj amikoj. La laboro de la pioniroj en lingvo-uzado kaj vortar-farado ĵetis lumon sur nia vojo. Tamen ankoraŭ restas mankoj kaj malĝustaĵoj. Pri ili kulpas nur la homa malforto de la aŭtoro.

SYLLA CHAVES
majo, 1991

ENHAV-TABELO

ANTAŬ-PAROLO
ENHAV-TABELO

BILDOJ

(100 paĝoj el 12 kategorioj)

GRAMATIKO
1 . . . . . Finaĵoj (1)
2 . . . . . Finaĵoj (2)
3 . . . . . Participoj
4 . . . . . AĴO kaj ULO
5 . . . . . INO, IDO, GE kaj VIR
6 . . . . . EGO, ETO kaj AĈO
7 . . . . . ADO
8 . . . . . ILO kaj AĴO
9 . . . . . EBLA, EMA kaj INDA
10 . . . . . ERO kaj ARO
11 . . . . . IGI kaj IĜI
12 . . . . . INGO kaj UJO
13 . . . . . EJO kaj ISTO
14 . . . . . UMI kaj UMO
15 . . . . . MAL
16 . . . . . Kalkuloj
17 . . . . . Pronomoj
18 . . . . . Prepozicioj
19 . . . . . Korelativoj
20 . . . . . Interjekcioj

LA HOMA KORPO
21 . . . . . Kapo
22 . . . . . Trunko
23 . . . . . Membroj

VESTAĴOJ
24 . . . . . Viraj vestaĵoj (1)
25 . . . . . Viraj vestaĵoj (2)
26 . . . . . Inaj vestaĵoj

BESTOJ
27 . . . . . En la koro
28 . . . . . En la bieno
29 . . Kelkaj grandeguloj (bestegoj)
30 . . . . . Birdoj (1)
31 . . . . . Birdoj (2)
32 . . . . . Vivo en la akvo (1)
33 . . . . . Vivo en la akvo (2)
34 . . . . Insektoj kaj aliaj bestetoj
35 . . . . . Aliaj malgranduloj
36 . . . . . Aliaj bestoj (1)
37 . . . . . Aliaj bestoj (2)
38 . . . . . Aliaj bestoj (3)

PLANTOJ
39 . . . . Ĝardenaj kreskaĵoj kaj iloj
40 . . . . . Floroj
41 . . . . . Fruktoj (1)
42 . . . . . Fruktoj (2)
43 . . . . . Fruktoj (3)
44 . . . . . Legomoj (1)
45 . . . . . Legomoj (2)
46 . . . . . Diversaj (1)
47 . . . . . Diversaj (2)
48 . . . . . Diversaj (3)

MANĜAĴOJ
49 . . . . . Manĝaĵoj (1)
50 . . . . . Manĝaĵoj (2)
51 . . . . . Manĝaĵoj (3)
52 . . . . . Manĝaĵoj (4)
53 . . . . . Manĝaĵoj (5)

LA DOMO
54 . . . . . La lerno-ĉambro
55 . . . . . La manĝo-ĉambro
56 . . . . . La kuirejo
57 . . . . . La dormo-ĉambro
58 . . . . . La banejo
59 . . . . . Fronta parto
(Fasado kaj pliaj detaloj)

LUDOJ KAJ SPORTOJ

60 . . . . . Ludoj kaj sportoj (1)
61 . . . . . Ludoj kaj sportoj (2)
62 . . . . . Ludoj kaj sportoj (3)
63 . . . . . Ludoj kaj sportoj (4)
64 . . . . . Ludoj kaj sportoj (5)

MUZIKO

65 . . . . . Muzik-instrumentoj (muzikiloj) (1)
66 . . . . . Muzik-instrumentoj (muzikiloj) (2)
67 . . . . . Muzik-instrumentoj (muzikiloj) (3)
68 . . . . . Muzik-instrumentoj (muzikiloj) (4)
69 . . . . . Kanto kaj muziko

URBAJ SCENOJ KAJ PEJZAĜOJ

70 . . . . . Strat-angulo
71 . . . . . Akcidento
72 . . . . . Ŝoseoj
73 . . . . . La haveno
74 . . . . . Karnavalo sur-strate
75 . . . . . De montoj al maro
76 . . . . . Monto-grimpado

DIVERSAJ

77 . . . . . Personoj (1)
78 . . . . . Personoj (2)
79 . . . . . Objektoj
80 . . . . . Agoj (1)
81 . . . . . Agoj (2)
82 . . . . . Rilatoj kaj komparoj

AL-DONO

83 . . . . . Bestetoj, bestegoj kaj bestaĉoj (1)
84 . . . . . Bestetoj, bestegoj kaj bestaĉoj (2)
85 . . . . . Bestetoj, bestegoj kaj bestaĉoj (3)
86 . . . . . Bestetoj, bestegoj kaj bestaĉoj (4)
87 . . . . . Bestetoj, bestegoj kaj bestaĉoj (5)
88 . . . . . Bestetoj, bestegoj kaj bestaĉoj (6)
89 . . . . . Bestetoj, bestegoj kaj bestaĉoj (7)
90 . . . . . el LIBERA EKFLUGO (1)
91 . . . . . el LIBERA EKFLUGO (2)
92 . . . . . el LIBERA EKFLUGO (3)
93 . . . . . Nombroj
94 . . . . . Kelkaj mezur-unuoj
95 . . . . . Temp-unuoj (1)
96 . . . . . Temp-unuoj (2)
97 . . . . . Tabelo de korelativoj
98 . . . . . Kun-metaĵoj kaj neologismoj (1)
99 . . . . . Kun-metaĵoj kaj neologismoj (2)
100 . . . . . Kelkaj mallongigoj

GLOSARO
ALFABETA VORT-LISTO
LAŬ-TEMA VORT-LISTO

1 - FINAĴOJ (1)

1.	**-A, -O**	BLANKA KNABO
2.	**-A, -O**	NIGRA KNABO
3.	**-AJ, -OJ**	GRANDAJ FIŜOJ
4.	**-AJ, -OJ**	MALGRANDAJ FIŜOJ
5.	**-O, -AS**	LA SINJORINO STARAS
6.	**-OJ, -AS**	LA KNABOJ SALUTAS UNU LA ALIAN
7.	**-ON**	LA BLANKA KNABO ĴETAS LA PILKON: ŜOTAS, PIED-BATAS
8.	**-AN, -ON**	LA PILKO TUŜAS LA NIGRAN KNABON
9.	**-OJN**	LA SINJORINO VOKAS LA KNABOJN
10.	**-AJN, -OJN**	LA GRANDAJ FIŜOJ MANĜAS LA MAL-GRANDAJN FIŜOJN
a.		GOLEJO
b.		LEDA PILKO
c.		PIED-BATO = ŜOTO
ĉ.		MAN-SIGNO
d.		AKRAJ DENTOJ



2 - FINAĴOJ (2)

1. **-E, -I** LERTE SALTI
2. **-E, -I** MALLERTE SALTI
3. **-E, -AS** KATO BONE SALTAS
4. **-OS** MI SALTOS
5. **-AS** MI SALTAS
6. **-IS** MI SALTIS
7. **-US** MI SALTUS, SE MI POVUS
8. **-U** SALTU

a. LAM-BASTONO

b. GIPSO-BANDAĜO

3 - PARTICIPOJ

1. **-ITA** MALFERMITA PORDO
2. **-ITA** PAPERUJO = TEKO: FERMITA
3. **-ONTA** FALONTA BOTELO
4. **-ANTA** FALANTA GLASO
5. **-INTA** FALINTA BUŜ-TUKO
6. **-OTAJ** LEGOTAJ LIBROJ:
   -ANTAJ STARANTAJ
7. **-ATA** LEGATA LIBRO:
   -ITA MALFERMITA
8. **-ITAJ** LEGITAJ LIBROJ:
   -ANTAJ KUŜANTAJ
9. **-ANTAJ** FLUGANTAJ KOLOMBOJ
10. **-ONTOJ** LA MANĜONTOJ STARAS EN VICO KAJ ATENDAS
11. **-ANTOJ** LA MANĜANTOJ SIDAS KAJ MANĜAS
12. **-INTOJ** LA MANĜINTOJ FOR-IRAS

a. KATO PETOLAS

b. STUDEMA KNABO

c. PLETOJ



4 - AĴO kaj ULO

1. **-ULO** BARBULO
2. **-ULO** SEN-HARULO
3. **-AĴO** TRINKAĴO
4. **-AĴO** MANĜAĴO
5. **-ULO** DIKULO
6. **-ULO** MALDIKULO
7. **-ULINO** BLONDULINO
8. **-ULETO** NIGRULETO
9. GLACIO
10. **-AĴO** GLACIAĴO
11. **-AĴO** OVAĴO: FRITITA OVO
12. **-AĴO** KRESKAĴO = PLANTO
13. **-ULO** LONG-KRURULO = VAD-BIRDO
14. **-AĴO** FORTIKAĴO
15. **-ULO** FORTULO
16. **-AĴO** KOKIDAĴO: ROSTAĴO
17. AKVO-GUTOJ
18. MASTO KAJ FLIRTANTA FLAGO
19. TURO
20. MUREGO
21. TORDATA FER-STANGO
22. OVO-FLAVO
23. OVO-BLANKO

5 - INO, IDO, GE kaj VIR

1. BESTOJ
2. HOMOJ
3. BOVOJ
4. LEONOJ
5. KAPROJ
6. KOKOJ
7. INFANOJ
8. **VIR-** VIR-BOVO = TAŬRO
9. **-INO** BOVINO
10. **-IDO** MAM(SUĈ)ANTA BOVIDO
11. **VIR-** VIR-LEONO
12. **-INO** LEONINO
13. **-IDOJ** LEONIDOJ
14. **VIR-** VIR-KAPRO = BOKO
15. **-INO** KAPRINO
16. **-IDO** KAPRIDO
17. **VIR-** VIR-KOKO
18. **-INO** KOKINO
19. **-IDO** KOKIDO
20. **-IDETO** KOKIDETO

PLEN-AĜULOJ = ADOLTOJ (21-22)

21. **VIRO:** PLEN-KRESKA VIRO
22. **VIRINO:** PLEN-KRESKA VIRINO
23. **GE-** GEJUNULOJ
24. **-ULINO** JUNULINO
25. JUNULO
26. **GE-** GEKNABOJ
27. **-INO** KNABINO
28. KNABO
29. BEBO
30. **GE-** GEFIANĈOJ
31. **-INO** FIANĈINO
32. FIANĈO
33. VUALO
34. **-INA** FIANĈINA ROBO
35. BUKEDO



6 - EGO, ETO kaj AĈO

1.	**-ETO**	RIDETO
2.		RIDO
3.	**-EGO**	RIDEGO
4.	**-ARO**	ŜTUPARO
5.		ŜTUPOJ
6.	**-ETARO**	ŜTUPETARO = ESKALO
7.	**-ETOJ**	ŜTUPETOJ
8.	**-AĈO**	DOMAĈO
9.	**-AĈO**	HUNDAĈO
10.	**-EGO**	HUNDEGO
11.	**-ETO**	HUNDETO
12.		ŜTRUMPO
13.	**-ETO**	ŜTRUMPETO
14.		ĈEVALO
15.	**-ETO**	ĈEVALETO
16.	**-ETO**	BIRDETO
17.	**-AĈO**	ĈEVALAĈO
18.	**-EGOJ**	UNGEGOJ
19.		UNGO
20.	**-ILO**	TRANĈILO
21.	**-ILEGO**	TRANĈILEGO
22.		KLINGO EL ŜTALO
23.		KOL-HARARO
24.		RUBUJO = BALAAĴUJO: EL LADO
25.		TEGMENTO EL PAJLO
26.		MURO EL ARGILO
27.		PORDO EL LIGNO

7 - ADO

1.		(VESTO)BROSO
2.	**-ILO**	TENILO
3.		HAROJ
4.	**-ADO**	BROSADO
5.		TELEFONO
6.	**-ADO**	TELEFONADO
7.		KRONO
8.		EPISKOPO
9.		NOVA REĜO
10.	**-ADO**	KRONADO
11.		MARTELO
12.		NAJLO
13.	**-ADO**	MARTELADO
14.		PAFO
15.	**-ADO**	PAFADO
16.		KUGLOJ
17.	**-INGOJ**	KUGLINGOJ = KARTOĈOJ
18.	**-ETAĴOJ**	KUGLETAĴOJ = PLUMBEROJ
	-ILOJ	**PAFILOJ (19-22)**
19.		FUSILO
20.	**-ETO**	MITRALETO
21.		REVOLVERO
22.		PISTOLO
23.	**-ANO**	POLICANO
24.		KUGLO-ZONO
25.	**-INGO**	PISTOLINGO
26.		KEPO
27.		BANDITOJ
28.	**-ITO**	VUNDITO
29.	**-ILO**	APOGILO
30.	**-ILO**	ŜARGILO
31.		TUBO
32.	**-ILO**	CELILO
33.	**-ILO**	EL-LASILO
34.	**-AĴOJ**	PAFAĴOJ

8 - ILO kaj AĴO

1. -ILO HAR-TUKO
2. -ILO TENILO
3. ANTAŬ-TUKO
4. -ILO BALAILO
5. -AĴO BALAAĴO
6. -ILO TRANĈILO
7. -AĴOJ TRANĈAĴOJ
8. -ILO HAKILO
9. -ILO SEGILO
10. -AĴO ĈASAĴO
11. -ISTO ĈASISTO
12. -ILO PAFILO
13. KUGLO-ZONO
14. -ILO TONDILO
15. -ILO TENISA BATILO = RAKEDO
16. -ILO KOMBILO
17. -ANTO LEGANTO
18. -AĴO LEGAĴO
19. -ILO SKRIBILO: FONTO-PLUMO
20. -AĴO SKRIBAĴO: LETERO
21. -ILO FOTOGRAFILO = FOTILO
22. -AĴO FOTOGRAFAĴO = FOTO
23. KLINGO
24. DENTOJ

9 - EBLA, EMA kaj INDA

1. -EGEMA MANĜEGEMA DIKULINO
2. -EBLA FLEKSEBLA BRANĈO
3. -EBLA NE-FLEKSEBLA BRANĈO
4. -INDA RIDINDA SITUACIO
5. -INDA RIPROĈINDA AGO
6. -EBLA ROMPEBLA VITRO
7. -INDA LAŬDINDA AGO
8. -INDA TIMINDA OKAZAĴO
9. -EMA PETOLEMA KNABO
10. -ANTA TIMANTA KATO
11. -EMA STUDEMA KNABO
12. -EMA BIRDO: PAPAGO: PAROLEMA = BABILEMA
13. -IGA SILENTIGA MAN-SIGNO
14. -AĴO MANĜAĴO: VIANDO
15. -AĴO RESTAĴO: OSTOJ
16. CEREMONIA JAKO
17. SUB-VESTO: KALSONO
18. -ANTAJ FALANTAJ FOLIOJ
19. ŜTALAJ MUSKOLOJ
20. BELULINO: MALFORTA = FEBLA
21. -OTA ĴETOTA ŜTONO
22. -EROJ VITREROJ
23. SAVA PLONĜO
24. MANA HELPO-PETO
25. ATENTA MIENO



10 - ERO kaj ARO

1. ĈENO
2. -ERO ĈENERO
3. MONO
4. -ERO MONERO
5. LIGNO
6. -ERO LIGNEROJ
7. NEĜO
8. -ERO NEĜERO
9. FAJRO
10. -ERO FAJRERO
11. FIŜO
12. -ARO FIŜARO
13. BOVO
14. -ARO BOVARO
15. DENTO
16. -ARO DENTARO
17. BIRDO
18. -ARO BIRDARO
- a. (MON)BILETO
- b. ŜTIPO
- c. NEĜ-HOMO
- ĉ. BRUL-LIGNO
- d. DENT-RADIKO
- e. DENT-KARNO = GINGIVO



11 - IGI kaj IĜI

1. MALPLENA SITELO
2. PLENA KORBO
3. -IĜI PLENIĜI
4. -IĜI MALPLENIĜI
5. -IGI PLENIGI SITELON
6. -IGI MALPLENIGI SITELON
7. STARI
8. SIDI
9. -IĜI SIDIĜI
10. -IGI SIDIGI
11. -IGI KURBIGI
12. -IĜI KURBIĜI
- a. KURBA TENILO
- b. TOLAĴO
- c. KRANO
- ĉ. TRUO: LIKANTA
- d. STANGO



12 - INGO kaj UJO

1.		KANDELO
2.	-INGO	KANDELINGO
3.		FINGRO
4.	-INGO	FINGRINGO
5.		TASO DA KAFO
6.		KAF-BEROJ
7.	-UJO	KAF-BERUJO = KAF-ARBO
8.		GLAVO
9.	-INGO	GLAVINGO
10.		CIGAREDO
11.	-UJO	CIGAREDUJO
12.	-INGO	CIGAREDINGO
13.		TRANĈILO
14.	-INGO	TRANĈILINGO
15.		BANANO
16.	-UJO	BANANUJO
17.		PIEDO
18.	-INGO	PIEDINGO
a.		FLAMO
b.		FADENO
c.		KUDRILO
ĉ.		KVASTO
d.		PUFA MANIKO
e.		ŜELO
f.		BANANARO: BANANA SPADIKO
g.		SPRONO



13 - EJO kaj ISTO

1.	-EJO	VENDEJO = BUTIKO
2.	-EJO	LERNEJO
3.	-EJO	KUIREJO: RESTORACIA
4.	-EJO	OFICEJO
5.	-ISTO	VENDISTO
6.	-ISTINO	INSTRUISTINO
7.	-ISTO	KUIRISTO
8.	-ISTO	OFICISTO
9.	-ISTO	POLICISTO
10.	-ISTO	ŜU-FLIKISTO
11.	-ISTINO	KUDRISTINO
12.	-ISTINO	TAJPISTINO
13.	-ISTO	KURACISTO
14.	-ISTO	PENTRISTO
15.	-ANTINO	AĈETANTINO
16.	-ANTOJ	GELERNANTOJ
17.	-INO	SEKRETARIINO
18.		PACIENTO
a.		VENDO-TABLO
b.	-AĴOJ	VENDAĴOJ = VAROJ
c.	-ILO	(KAS)REGISTRILO
ĉ.	-ILO	SEN-ŜAŬMIGILO
d.		HOKOJ
e.		BOVLO
f.		OV-ŜELO
g.	-AĴO	FRITAĴO: OVAĴO: OMLETO
ĝ.	-ILO	FRITILO = PATO
h.	-ILO	FAJFILO
ĥ.		KUDRO-MAŜINO
i.	-AĴO	KUDRAĴO
j.		BOBENO
ĵ.	-ILOJ	SKRIBILOJ
k.	-ILO	SKRIB-MAŜINO = TAJPILO
l.		KALENDARO
m.	-AĴO	TAJPAĴO: PAPERO
n.		BUŜA SPIRO
o.	-ILO	AŬSKULTILO
p.		STABLO
r.	-AĴO	PENTRAĴO
s.		PENIKO
ŝ.		PALETRO
t.		FARBO-SKATOLO
u.		FARBO-TUBOJ

14 - UMI kaj UMO

1. **-UMI** VENTUMILO
2. **-UMI** CERBUMI = PENSI
3. **-UMI** BRAKUMI = ĈIRKAŬ-BRAKI
4. **-UMO** KOLUMO
5. **-UMO** KALKANUMO
6. KALKANO
7. PUGNO = FERMITA MANO
8. **-UMO** MANUMO
9. **-UMI** AKV(UM)I
10. **-UMI** PALPEBRUMI: UNU-OKULE
11. **-UMI** BUTON(UM)I
12. **-UMI** SAPUMI
13. **-UMI** PENDUMI
14. **-UMI** FOLIUMI

a. HAR-TUBERO = HAR-NODO
b. KOLO
c. SAPO
ĉ. ŜAŬMO
d. ANSO
e. ĈEMIZO SEN KOLUMO = T-ĈEMIZO

15 - MAL

1. JUNA
2. **MAL-** MALJUNA = OLDA
3. GAJA
4. **MAL-** MALGAJA = TRISTA
5. ELEGANTA
6. **MAL-** MALELEGANTA
7. SATA KAJ RIĈA
8. **MAL-** MALSATA KAJ MALRIĈA
9. RAPIDA
10. **MAL-** MALRAPIDA = LANTA
11. PURA: POST BANO
12. **MAL-** MALPURA: POST LABORO
13. SANA
14. **MAL-** MALSANA

a. FOTELO = REMBURITA APOG-SEĜO
b. BASTONO
c. BUKEDO
ĉ. TESTUDO
d. LEPORO
e. BAN-TUKO
f. ŜRAŬB-ŜLOSILO
ĝ. PALPI LA PULSON
h. KIRASO: KARAPACO



16 - NOMBROJ KAJ KALKULOJ

1. **UNU**
2. **DU**
3. **TRI**
4. **KVAR**
5. **KVIN**
6. **SES**
7. **SEP**
8. **OK**
9. **NAŬ**
10. **DEK**
11. **NUL**
12. **CENT**
13. **MIL**
14. \+ OK PLUS DU
15. − NAŬ MINUS TRI
16. : OK DIVIDITE PER KVAR
17. X KVINOBLE KVIN
18. = ESTAS = EGALAS
19. **-OBLA** DUOBLA GLASO
20. **-OPE** PROMENI DUOPE

FRAKCIOJ (21-23)

21. **-ONO** DUONO
22. **-ONO** TRIONO
23. **-ONO** SESONO
24. **PO** PRENU PO DU DOLĈAĴOJN
25. **KOLOROJ DE LA TRI KATOJ:**
26. **UNUA** LA UNUA ESTAS NIGRA
27. **DUA** LA DUA ESTAS GRIZA
28. **TRIA** LA TRIA ESTAS BLANKA



17 - PRONOMOJ

1. **ONI** ĈI TIE ONI KANTAS
2. **MI** MI KANTAS
3. **NI** NI KANTAS KUNE: ĤORE
4. **VI** VI KANTAS
5. **ŜI** ŜI KANTAS
6. **ILI** ILI KANTAS KUNE: ĤORE
7. **ŜI** ŜI KANTAS
8. **LI** LI KANTAS
9. **LI** ANKAŬ LI KANTAS
10. **ĜI** KAJ ANKAŬ ĜI KANTAS
11. **LI, ŜIN** LI VIDAS ŜIN EN LA SPEGULO
12. **ŜI, SIN** ŜI VIDAS SIN EN LA SPEGULO
13. MANO
    a. FINGRO: MALLONGA = ETA
    b. FINGRO: RINGA
    c. FINGRO: LONGA = MEZA
    ĉ. FINGRO: MONTRA
    d. FINGRO: DIKA = POLEKSO
    e. SPEGULO
    f. GESTOJ

18 - PREPOZICIOJ

1. **EKSTER** KNABINO EKSTER LA ĈAMBRO
2. **EN** (SKRIB)TABLO EN LA ĈAMBRO
3. **ĈE** SKRIBANTO ĈE LA TABLO
4. **SUPER** LAMPO SUPER LA TABLO
5. **SUPRE DE** VEL-ŜIPETO SUPRE DE LA BRETARO
6. **LAŬ** GRIMPO-PLANTO SUPREN LAŬ LA MURO
7. **MEZE DE** SKATOLO MEZE DE LA LIBRO-BRETO
8. **SUR** KAJERO SUR LA TABLO
9. **ANTAŬ** KNABINO ANTAŬ LA SKRIBANTO
10. **MALANTAŬ** FUMANTO MAL-ANTAŬ LA SKRIBANTO
11. **MALSUPRE DE** ŜRANKETO MAL-SUPRE DE LA BRETARO
12. **SUR** TAPIŜO SUR LA PLANKO
13. **SUR** KATO SUR LA SEĜO
14. **SUB** PILKO SUB LA SEĜO
15. **SUR** PIEDO SUR LA ŜOJLO
16. **EL** VERŜO EL LA GLASO
17. **EL** ŜNURO PENDANTA EL LA RUBUJO = BALAAĴUJO
18. **INTER** HUNDO INTER LA INFANOJ
19. KUŜANTA INFANO
20. STARANTA INFANO
21. SIDANTA INFANO
22. STARIĜANTA INFANO
23. **PER** LUDADO: PER AVIADILO = AVIO
24. **AL, ŜUR** FALO: AL LA TAPIŜO = ŜUR LA TAPIŜON
25. **ĈIRKAŬ** CIRKAŬ LA KOLO
26. VINDO = VINDO-TUKO
27. **JE** PRENO JE LA ORELO
28. **EN** CIGAREDO EN LA BUŜO
29. **EL** FUMO EL LA CIGAREDO
30. **POR** BATILO POR TENISO = RAKEDO
31. **DE** PENDADO DE LA PLAFONO
32. **PER** SKRIBADO PER KRAJONO
33. LUD-VESTO: KOMBINEO



19 - KORELATIVOJ

1. **KIO ?**
2. **TIO** = LA ŜLOSILO
3. **KIU ?**
4. **TIU** = LA KNABINO
5. **KIA ?**
6. **TIA** = ALTA
7. **KIES ?**
8. **TIES** = DE ĈI TIU JUNULO
9. **KIE ?**
10. **TIE** = EN LA SAKO
11. **KIAM ?**
12. **TIAM** = VENDREDE, LA 14-AN DE JULIO
13. **KIOM ?**
14. **TIOM** = IOMETE
15. **KIEL ?**
16. **TIEL** = LERTE
17. **KIAL ?**
18. **TIAL** = PRO EBRIECO = ĈAR LI ESTIS EBRIA

a. FORKO
b. KOMBILO
c. ŜLOSILO
ĉ. PAPER-PREMILO = PAPER-KLIPO
d. KNABO
e. KNABINO
f. ALTA
g. DIKA
ĝ. KEPO
h. TIR-KESTO
ĥ. SAKO
i. SKATOLO
j. KALENDARO
ĵ. DATO
k. KUKO KOVRITA PER KREMO
l. ATLETO SALTANTA
m. BARO
n. LUM-FOSTO
o. FRAKASITA AŬTOMOBILO
p. EBRIULO
r. ALKOHOLAĴO = DRINKAĴO

20 - INTERJEKCIOJ

1. **HA LO!**
2. **FOR!**
3. **HO VE!**
4. **ĈIT! = ŝŝ!**
5. **BA!**
6. **AJ!**
7. **HA, HA, HA!**
8. **HE!** HE, VI!
9. **UF!**
10. **HM!**
11. **NU!**

a. FOR-PELO
b. FOR-KURO = FUĜO
c. ŜTELO
ĉ. FRAPO KAJ DOLORO
d. LAŬT-PAROLILO
e. GRAMOFONO
f. DISKOJ
g. BRUO
ĝ. VOKO
h. RIPOZO
ĥ. PENSADO
i. PEZAJ VALIZOJ



21 - KAPO

1. KRANIO = KAP-OSTARO
2. KAPO
3. TEMPIO
4. DENTOJ
5. MAKZELO
6. DEKSTRA OKULO
7. FRUNTO
8. BROVO
9. HAROJ
10. DEKSTRA ORELO
11. NAZO
12. VANGO
13. BUŜO
14. MENTONO
15. KOLO
16. IRISO
17. PUPILO
18. LARMO = PLOR-GUTO
19. OKUL-HAROJ
20. PALPEBRO
21. NAZ-TRUO
22. SUPRA LIPO
23. LIP-HAROJ
24. LANGO
25. BARBO
26. MALSUPRA LIPO
27. GORĜO KAJ FARINGO
28. NUKO
29. EZOFAGO
30. CERBO
31. VIZAĜO



22 - TRUNKO

1. KAPO
2. KOLO
3. NUKO
4. ŜULTRO
5. BRUSTO
6. DORSO
7. SID-VANGOJ
   = PUGO, POSTAĴO, GLUTEOJ
8. VENTRO = ABDOMENO
9. TALIO
10. UMBILIKO
11. KOKSO
12. PUBO KAJ INGVENO
13. FEMURO
14. MAMO
15. MAM-PINTO = CICO
16. PELVO
17. SPINO = VERTEBROJ
18. STERNUMO
19. RIPOJ
20. DEKSTRA PULMO
21. KORO
22. STOMAKO
23. MALDIKA INTESTO
24. DIKA INTESTO
25. APENDICO
26. ANUSO
27. HEPATO
28. GALA VEZIKO
29. RENO: MALDEKSTRA
30. URINA VEZIKO



23 - MEMBROJ

1. MUSKOLO
2. OSTO
3. HAŬTO
4. SANGO-TUBOJ
5. BRAKO
6. KRURO
7. MANOJ
8. PIEDOJ
9. ŜULTRO
10. KLAVIKLO
11. SKAPOLO
12. AKSELO = SUB-BRAKO
13. ŜVITO
14. KUBUTO
15. ANTAŬ-BRAKO
16. MAN-RADIKO
    = MAN-ARTIKO, POJNO
17. PUGNO
18. HUMERO
19. MAN-PLATO
    = MAN-KAVO, POLMO
20. FINGROJ
21. UNGO
22. DIKA FINGRO = POLEKSO
23. VEJNOJ: VOJE AL KORO
24. ARTERIOJ: VOJE EL KORO
25. FEMURO
26. FEMUR-OSTO
27. GENUO
28. TIBIO
29. FIBULO
30. MALEOLO
31. KALKANO
32. PIED-SUPRO = INSTEPO
33. PIED-FINGROJ
34. PLANDO

24 - VIRAJ VESTAĴOJ (1)

1. ĈAPELO
2. ĈIRKAŬ-RANDO
3. KOMPLETO
4. UNIFORMO: SOLDATA
5. SMOKINGO
6. KRAVATO
7. KOL-TUKO
8. KOLUMO
9. MANUMO
10. MANIKO
11. ĈEMIZO
12. VEŜTO
13. JAKO
14. PANTALONO
15. MANTELO
16. ZONO
17. POŜO
18. PAPERUJO = TEKO
19. BUTONOJ
20. POŜ-TUKO = NAZ-TUKO
21. ŜUOJ
22. BOTO
23. PIED-VESTOJ
24. KAP-VESTOJ
25. KASKEDO
26. KEPO
27. VIZIERO
28. TURBANO
29. ĈAPO
30. KASKO
31. OKUL-VITROJ

25 - VIRAJ VESTAĴOJ (2)

1. FRAKO
2. BASKOJ
3. ĈEMIZO
4. KRAVATO
5. KOLUMO
6. MANUMO
7. PANTALONO
8. POŜO
9. ZONO
10. BUKO
11. MANIKO
12. POŜ-TUKO = NAZ-TUKO
13. LEDA PALTO
14. LAN-VESTO: PULOVERO = SVETERO
15. BAN-VESTO
16. SUB-VESTO
17. BAN-TUKO
18. BAN-KALSONO
19. SUB-ĈEMIZO
20. KALSONO
21. PLUV-OMBRELO
22. PLUV-MANTELO
23. TENILO
24. PIED-VESTOJ
25. SANDALO
26. PLANDUMO
27. RIMENOJ
28. PANTOFLO
29. BOTO
30. KRURINGO
31. KALKANUMO
32. PINTO: ŜU-PINTO

a. KAPUĈO

26 - INAJ VESTAĴOJ

1. BLUZO
2. JUPO
3. ROBO
4. ZONO
5. BUKO
6. BRAK-RINGOJ = BRACELETOJ
7. MAN-SAK(ET)O
8. ŜUO
9. KALKANUMO
10. OREL-RINGO
11. BANTO
12. MAM-ZONO = MAM-TENILO
13. KALSON(ET)O
14. ŜTRUMPO
15. ŜTRUMP-LIGILO
16. SUB-ROBO
17. ĈAPO
18. ĴAKETO
19. GANTOJ
20. BUTONOJ
21. MANTILO
22. KUFO
23. SARIO
24. KOMBILO

JUVELOJ (25-27)

25. KOL-ĈENO = KOLIERO
26. BROĈO
27. RINGOJ
28. PIEDOJ: NUDAJ = SEN-ŜUAJ

27 - EN LA KORTO

1. MELEAGRO
2. NUMIDO
3. PAVO
4. FAZANO
5. KOBAJO = MALSOVAĜA KAVIO
6. ANSERO
7. KOKO: VIR-KOKO
8. KOKINO: PRETIĜANTA POR KOVI
9. ANASO
10. KOTURNO
11. CIGNO
12. PORKO
13. KUNIKLO
14. KOKEJO

a. TEGOLOJ
b. TABULOJ
c. SID-STANGOJ
ĉ. KRESTO
d. NESTO
e. OVOJ
f. BEKO
g. MUZELO
ĝ. VOSTO
h. HUFO
ĥ. FLUGILO
i. ORELOJ
j. PLUMO

28 - EN LA BIENO

1. ĈEVALO: GALOPANTA
2. BOVOJ: EKSVIR-BOVOJ
3. VIR-BOVO = TAŬRO
4. AZENO
5. MULO
6. ŜAFOJ
7. BOVINO
8. BOVIDO
9. KAPRO
10. BARILO

a. BLUA ĈIELO
b. NUBOJ
c. SUNO
ĉ. FUMO
d. STALO
e. KAMPARA DOMO
f. RAJDANTO
g. PLUGILO
ĝ. BOV-ĈARO
h. RADO
ĥ. JUNGILO
i. VIPO
j. BRIDO
ĵ. PAŜTISTO
k. BASTONO
l. KAMPARA VOJO
m. PALISO
n. PIK(IL)-DRATO



29 - KELKAJ GRANDEGULOJ (BESTEGOJ)

1. BALENO: MARA MAMULO
2. RINOCERO
3. GORILO: SIMIEGO
4. ŜARKO: FIŜEGO
5. KONDORO: BIRDEGO
6. DELFENO: MARA MAMULO
7. TAPIRO
8. BUBALO
9. STRUTO: BIRDEGO
10. ĜIRAFO
11. CERVO
12. LEONO
13. TIGRO

a. AKVO-ŜPRUCO
b. VOSTO
c. NAĜILO
ĉ. KORNO
d. BRANĈ-KORNO
e. BEKO
f. LONGA KOLO
g. FLUGILO
ĝ. UNGEGOJ
h. DENTEGOJ
ĥ. KOL-HAROJ
i. STRIOJ
j. MAKULOJ



30 - BIRDOJ (1)

1. PAPAGO
2. MEVO
3. KOLIBRO
4. ARAO
5. KAKATUO
6. PINGVENO
7. PASERO
8. KUKOLO
9. PELIKANO
10. TUKANO
11. SERPENTO
12. SERPENTARIO
13. PEGO
14. FORNARIO
15. KIVIO
16. ARDEO
17. VANELO
18. GRUO
19. STRIGO
20. NIZO
21. CIKONIO
    a. BEKO
    b. BEK-POŜO
    c. FLUGILO
    ĉ. SEN-FLUGILA BIRDO
    d. VOSTO
    e. UNGEGO
    f. PLUM-TUFO = KRESTO
    g. NESTO DE LA FORNARIO: EL ARGILO

31 - BIRDOJ (2)

1. KECALO
2. ALAŬDO
3. TURTO
4. NAJTINGALO
5. TETRAO
6. ALBATROSO
7. HIRUNDO
8. VULTURO
9. SKOLOPO
10. PITANGO
11. AGLO
12. KORVO
13. KANARIO
14. ZONOTRIKO
15. TURDO
    a. KADAVRAĴO
    b. KAPTAĴO = PREDO
    c. KAĜO
    ĉ. BALANCILO
    d. MANĜUJETO KUN MILIO
    e. NESTO
    f. BIRDIDOJ
    g. MANĜIGADO



32 - VIVO EN LA AKVO (1)

1. KANKRO
2. TRUTO
3. HUZO
4. PALINURO
5. HARINGO
6. FIŜARO: HARINGOJ
7. PIRANJO
8. ROSMARO
9. MURENO
10. KARPO
11. PETROMIZO
12. MERLANGO
13. PLEŬRONEKTO
14. FRAJO
15. STURGO
16. GOBIO
17. SOLEO
18. LUTRO
19. EZOKO
20. TINKO



33 - VIVO EN LA AKVO (2)

1. FIŜ-HOKO

KONKULOJ
= KONK(PORT)AJ MOLUSKOJ (2,10)

2. OSTRO

KRUSTULOJ (3-5)

3. KRABO
4. OMARO
5. SALIKOKO
6. POLPO
7. MAR-STELO = ASTERIO
8. MAR-ĈEVALETO = HIPOKAMPO
9. LOLIGO
10. MITULOJ
11. MEDUZO
12. SPAD-FIŜO
13. ANGILO
14. MAR-HUNDO = FOKO
15. MORUO
16. SALMO
17. RAJO

a. LOGAĴO: VERMO
b. KONKO
c. PINĈILO
ĉ. BRAKOJ
d. PALPILOJ
e. KAPO
f. VOSTO
g. NAĜILO
ĝ. SKVAMOJ



34 - INSEKTOJ KAJ ALIAJ BESTETOJ

1. PAPILIO:
   MULT-KOLORA = BUNTA
2. RAŬPO
3. MUSO
4. ARANEO
5. MUŜO
6. FORMIKO
7. BRUT-LAŬSO = IKSODO
8. KOKCINELO
9. TALPO
10. SKARABO
11. LIT-LAŬSO = CIMO
12. CIKADO
13. LIMAKO
14. GRILO
15. MOSKITO: KULO
16. HELIKO
17. MIL-PIEDULO = SKOLOPENDRO
18. SCIURO
19. MANTO: ŜAJNE PREĜANTA
20. BLATO
21. HIRUDO
22. LIBELO
23. PULO
24. MUR-LACERTO = GEKO
25. LACERTO
26. SKORPIO
    a. FLUGILO
    b. VOSTO
    c. KONKO
    ĉ. ARANEAĴO = ARANEA RETO
    d. PIKILO
    e. PALPILO
    f. SUĈILO

35 - ALIAJ MALGRANDULOJ

1. GENOTO
2. SORIKO
3. ERINACO
4. MARMOTO
5. SIMIETO
6. KAVIO
7. KRABRO
8. ABELO
9. RATO
10. ZIZELO
11. AKRIDO
12. LAMPIRO
13. TERMITO
14. HOM-LAŬSO = PEDIKO
15. KAMELEONO
16. BUFO
17. VERDA RANETO = HILO
18. MELO
19. NAZUO
20. PUTORO
    a. MIEL-ĈELARO
    b. PIKILOJ
    c. VOSTO: PREN-POVA
    ĉ. VENTRO: LUMA



36 - ALIAJ BESTOJ (1)

1. ĈIMPANZO
2. KROKODILO
3. ALIGATORO
4. ELEFANTO
5. SON-SERPENTO = KROTALO
6. HISTRIKO
7. DAZIPO
8. VESPERTO: FLUGANTA MAMULO
9. VULPO
10. HIPOPOTAMO
11. ŜAKALO
12. KASTORO
13. KAMELO: DU-ĜIBA
14. ORNITORINKO
15. DIDELFO
16. KAPIBARO
    a. ROSTRO
    b. PINGLOJ
    c. KLAKILO
    ĉ. ĜIBO
    d. FLUGILO
    e. VOSTO
    f. DENTEGOJ
    g. BEKO
    ĝ. POŜO: VENTRA
    h. KIRASO: KARAPACO
    ĥ. VOSTO: PLATA
    i. VOSTO: SEN-HARA KAJ PREN-POVA



37 - ALIAJ BESTOJ (2)

1. JAGUARO
2. ORANGUTANGO
3. LJAMO
4. KANGURUO
5. NORDA CERVO = BOACO
6. AGUTIO
7. FORMIK-URSO = MIRMEKOFAGO
8. ALKO
9. HIENO
10. KOBRO = NAJO
11. URSO
12. LEPORO
13. BRADIPO
14. SOVAĜA PORKO = APRO
15. LINKO
    a. BRANĈ-KORNOJ
    b. PLATAJ (BRANĈ)KORNOJ
    c. VOSTO
    ĉ. KOLO: PLI-LARĜIGITA
    d. MAKULOJ
    e. POŜO: VENTRA
    f. DENTEGOJ
    g. BRANĈO: ARBA
    ĝ. MUZELO



38 - ALIAJ BESTOJ (3)

1. PRA-BOVO = URO
2. BIZONO
3. OKAPIO
4. PAVIANO
5. UNU-ĜIBA KAMELO = DROMEDARO
6. ZEBRO
7. PRA-ELEFANTO = MAMUTO
8. BOAO
9. GNUO
10. PANTERO = LEOPARDO
11. ANTILOPO
12. LUPO
13. LUPO: TASMANIA
14. ALPAKO

a. ĜIBO
b. STRIOJ
c. MAKULOJ
ĉ. KORNOJ
d. DENTEGOJ
e. ROSTRO
f. LANO



39 - ĜARDENAJ KRESKAĴOJ KAJ ILOJ

1. TULIPO
2. LILIO
3. SUN-FLORO = HELIANTO
4. ROZO
5. DIANTO
6. TOMATO
7. KUKUMO
8. BULBO: CEPO
9. FLOR-BRASIKO
10. KAROTO
11. AJLO
12. LAKTUKO
13. PIZO
14. TER-POMO
15. NAPO

a. VICO DA ARBOJ
b. ALEO
c. RADIKO
ĉ. TRUNKO
d. BRANĈOJ
e. ROZUJO
f. PETALOJ
g. FOLIOJ
ĝ. PIKILO: DORNO
h. BURĜONO
ĥ. GRAJNOJ
i. GRAJNUJO = GUŜO
j. REKTA ŜPATO
ĵ. TENILO
k. ĈARUMO
l. FLOR-BEDO
m. RASTILO
n. FORKEGO
o. PAJLA KORBO
p. HERBO
r. AKV(UM)ILO
s. ĜARDENISTO
ŝ. ANTAŬ-TUKO
t. TIGO

40 - FLOROJ

1. VIOLO
2. PAPAVO
3. DALIO
4. MALVO
5. LEKANTO
6. GERANIO
7. IRIDO
8. LEONTODO
9. PRIMOLO
10. KAMELIO
11. KRIZANTEMO
12. NEĜ-FLORO = EDELVEJSO
13. SIRINGO
14. JASMENO
15. ORKIDEO
16. MAJ-FLORO = KONVALO
17. LAVENDO
18. FILIKO
19. KAKTO
20. MAJORANO
21. MIOZOTO
22. URTIKO



41 - FRUKTOJ (1)

1. ORANĜO
2. BANANOJ
3. CITRONO
4. GRAPFRUKTO
5. POMO
6. PIRO
7. SUKER-POMO
8. MANDARINO
9. PRUNO
10. PERSIKO
11. PERSIMONO
12. MELONO
13. AKVO-MELONO
14. FIGO
15. PAN-FRUKTO
16. AVOKADO
17. KARAMBALO
18. BEROJ
19. ĈERIZOJ
20. FRAMBO
21. FRAGO
22. VIN-BEROJ
    a. BANANARO: SPADIK-PECO
    b. DAŬBAĴOJ
       = SEGMENTOJ (ONOJ, EROJ)
    c. KARNO-PECOJ
    ĉ. TRANĈAĴO
    d. AL-KROČILO = ČIRO
    e. VIN-BERARO: GRAPOLO
    f. KERNO



42 - FRUKTOJ (2)

1. ANAKARDIO = AKAĴUO
2. CIDONIO
3. GUJAVO
4. KOKOSO: KOKOSA NUKSO
5. MANGO
6. PAPAJO
7. LIĈIO
8. ANANASO
9. PASI-FLORO
10. PASI-FRUKTO = GRENADILO
11. DAKTILO
12. JAKVO
13. KAKTO-FIGOJ
14. KAKAO
    a. NUKSO
    b. GRAJNETOJ
    c. KARNO
    ĉ. KOKOSA AKVO
    d. AL-KROĈILO = ĈIRO
    e. PIKILOJ: DORNOJ
    f. GRAJNOJ



43 - FRUKTOJ (3)

1. KAF-BEROJ
2. AVELOJ
3. BRAZILA NUKSO
4. JUGLANDO
5. OLIVOJ
6. PIN-FRUKTO = STROBILO
7. MIGDALO
8. KAŜTANOJ
9. GRANATO
10. ARASAO
11. TAMARINDO: GRAJNUJO = GUŜO
12. SAPOTO
13. TER-NUKSOJ = ARAKIDOJ
14. PITANGOJ
15. GVARAN-BEROJ
    a. JUGLANDA NUKSO
    b. JUGLANDA KERNO
    c. PINGLOJ
    ĉ. PIN-GRAJNOJ
    d. MIGDALA FRUKTO
    e. MIGDALA NUKSO
    f. MIGDALA KERNO = AMANDO



44 - LEGOMOJ (1)

1. KUKURBO
2. KUKUMO
3. CEPO
4. ŜENOPRAZO
5. MAIZA SPIKO
6. FLOR-BRASIKO
7. AJLO
8. KRESO
9. ARTIŜOKO
10. POREO
11. PIPRO : KAJENA
12. KAPSIKO: DOLĈA
13. PIPRO: NIGRA
14. ĈAJOTO
15. (ĈAPEL)FUNGO = ĈAMPINJONO
16. RAFANO
17. CIKORIO



45 - LEGOMOJ (2)

1. PIZO
2. FAZEOLO
3. KAP-BRASIKO
4. BRASIKO
5. DOLĈA MANIOKO
6. GOMBO
7. BRUSEL-BRASIKO
8. MELONGENO
9. ASPARAGO
10. PALM-KOROJ
11. RABARBO
12. CELERIO
13. PETROSELO
14. DOLĈA TER-POMO = PATATO
15. BETO
16. LENTO
17. LAŬRO-FOLIOJ
18. ZINGIBRO
19. BROKOLO
20. IGNAMO



46 - DIVERSAJ (1)

1. GLICIRIZO
2. ROSMARENO
3. ALGO
4. MUSKO
5. REZEDO

KANOJ (6-7)

6. SUKER-KANO
7. BAMBUO
8. JUNKO
9. LINO
10. NIMFEO: AMAZONIA
11. HEDERO
12. ALTEO
13. AKVILEGIO
14. KOTONO
15. TRI-FOLIO



47 - DIVERSAJ (2)

1. KVERKO
2. CIPRESO
3. BRAZILA PINO = ARAŬKARIO
4. KAŜTAN-ARBO
5. PALMO
6. CEDRO
7. ABIO
8. BAOBABO
9. ULMO
10. AKACIO
11. SALIKO
12. TILIO



48 - DIVERSAJ (3)

1. **FLORO: LAŬ-LONGA SEKCO FLOR-FOLIOJ (2-3)**
2. PETALO = KOROLA FOLIO
3. SEPALO = KALIKA FOLIO
4. PISTILO
5. STAMENOJ
6. TIGO
7. **PRI-TONDADO**
8. TONDILO: HEĜA
9. GREFTAĴO: EN-METITA
10. **RIKOLTADO**
11. ŜARĜ-AŬTOMOBILO = KAMIONO
12. RIKOLT-MAŜINO: POR TER-POMOJ
13. TABAKO = NIKOTIANO
14. **GRENOJ = CEREALOJ**
15. TRITIKO
16. RIZO
17. MAIZO
18. SEKALO
    a. KAJUTO
    b. ŜARĜ-PLATO
    c. SPIKO
    ĉ. MAIZA SPIKO
    d. SEKALA GRAJNO = GRENERO



49 - MANĜAĴOJ (1)

1. ĈEFAJ PLADOJ
2. ANTAŬ-MANĜOJ
3. FIŜOJ = FIŜAĴO: KUN KUIRITAJ TER-POMOJ
4. BIFSTEKO: KUN FRITITAJ TER-POMOJ
5. MELEAGR(AĴ)O: KUN (ĈAPEL)FUNGOJ = ĈAMPINJONOJ
6. NUDELOJ: KUN TOMATA SAŬCO
7. VIANDO KAJ LARDO: EN ROSTO-STANGO
8. OSTROJ KAJ MITULOJ
9. TOMATO: KUN KAVIARA FARĈO
10. OVO: KUIRITA
11. PASTEĈOJ: FRITITAJ
12. AVOKADO: FARĈITA
13. ŜINKO: VOLVITA KUN POREO
14. LAD-SKATOLO DA SARDELOJ

50 - MANĜAĴOJ (2)

1. SUPUJO KUN BOLANTA SUPO
2. PICO:
   DISTRANĈITA EN SESONOJN
3. BOVLO : KUN RIZO
   KAJ MANĜ-BASTONETOJ
4. VIN-BOTELETO
5. KUIRADO KAJ SPICADO
6. CEPO, AJLO KAJ AJLERO
7. VINAGRO
8. LAD-SKATOLO DA OLIV-OLEO
9. ROST-BOVAĴO = ROSTBEFO
10. SAŬCUJO: KUN VIANDA SAŬCO
11. SALATO: LAKTUKA
    KAJ TOMATA
12. OLIVOJ
13. PEKLAĴO: KUKUMA

51 - MANĜAĴOJ (3)

1. PAN-ROSTAĴO = TOASTO
2. KRINGOJ
3. KRAKENOJ
4. BUTERO
5. FROMAĜOJ

DESERTOJ (6-18)

6. FRUKTO-SALATO
7. ĴELEO
8. MARMELADO
9. KOMPOTO
10. KAĈO
11. BOMBONO
12. KARAMELOJ
13. PASTELOJ
14. PANO
15. BULKOJ
16. GELATENAĴO
17. KUKO
18. TORTO



52 - MANĜAĴOJ (4)

1. FEMURAĴO: PORKA
2. ŜINKO
3. PASTO: HEPATA
4. MORTADELO
5. KOTLETO: ŜAFA
6. SALAMO
7. KOLBASO
8. KOLBASETOJ
9. LARDO
10. TRIPO
11. OMLETO KUN ŜINKO
12. ORANĜO-SUKO
13. SANDVIĈO: KOLBASETA
14. SANDVIĈO: VARMA
    a. TRANĈAĴO
    b. RET-SAKO
    c. FABRIK-MARKO
    ĉ. LAD-SKATOLO
    d. ORANĜO-PREMILO
    e. ŜINKO KAJ FROMAĜO



53 - MANĜAĴOJ (5)

1. **SALAJ MANĜAĴETOJ**
2. KOK-FEMURAĴO: PANUMITA = GRATENITA
3. VIAND-BULETO
4. PASTEĈO: FRITITA
5. PASTEĈO: BAKITA
6. **INGREDIENTOJ**
7. PAKO DA FARUNO
8. TASO DA FARUNO
9. DU OVOJ
10. PASTAĴO POR PASTEĈO
11. RUL-KNEDILO
12. **SPICOJ**
13. MUSTARDA TUBO
14. PIPRO: KAJENA
15. KARIOFILO
16. SALUJO
17. CINAMO
18. TEO: VARMEGA
19. BUTER-PANO
20. **PASTAĴOJ**
21. SPAGETOJ
22. NUDELOJ
23. MAKARONIOJ
24. PUDINGO
25. **DRINKAĴOJ**
26. LIKVORO
27. VINO
28. BIERO
29. VISKIO
    a. TASO
    b. SUB-TASO
    c. SAKETO DA TEO
    ĉ. TE-POTO
    d. TENILO = ANSO
    e. KOVRILO
    f. SUKERUJO
    g. BOTELOJ
    ĝ. POKALOJ = KALIKOJ
    h. PIEDO
    ĥ. GLASO
    i. ŜAŬMO
    j. MULDILO

54 - LA LERNO-ĈAMBRO

1. INSTRUISTINO
2. LERNANTO
3. LERNANTINO
4. PORDO
5. SKRIB-TABULO: NIGRA AŬ VERDA
6. KRETO
7. VIŝILO
8. MURO
9. ŝTRUMPETOJ
10. ŝUOJ
11. PODIO
12. PAPEROJ: ĉIFITAJ
13. PAPER-KORBO
14. MONTRO-STANGO
15. BILDO
16. MAPO
17. PLANKO
18. KLINKO
19. SERURO
20. ŝLOSILO
21. LERNEJA TORNISTRO
22. MALPLENA BENKO
23. SKRIB-TABLO: PUPITRO
24. KAJERO
25. LIBRO: LERNO-LIBRO
26. GLUUJO: GLU-BOTELETO
27. LINIILO: REKTILO
28. SKRAP-GUMO = FROT-GUMO
29. KRAJONO
30. GLIT-KALKULILO
31. ANGULILO
32. ORTILO
33. CIRKELO
34. GLOB-KRAJONO = GLOB-SKRIBILO
35. UNIFORMO: LERNEJA



55 - LA MANĜO-ĈAMBRO

1. BRETARO
2. RADI-APARATO = RADIO-RICEVILO, RADIOFONO
3. GRAMOFONO
4. DISKOJ
5. TELEVIDILO
6. KURTENO
7. LAMP-ŝIRMILO
8. LUL-SEĜO
9. MAGNETOFONO
10. GAZETO
11. CENTRA TABLETO
12. ORNAMA PLANTO
13. KUSENO
14. SOFO
15. PENTRAĴO
16. MANĜO-TABLO
17. BRAK-SEĜO = APOG-SEĜO
18. SERVISTINO
19. ANTAŬ-TUKO
20. SUPUJO
21. PLADOJ
22. BUŝ-TUKO
23. TABLO-TUKO
24. VIN-GLASO
25. VIN-BOTELO
26. AKVO-KARAFO
27. PAN-PECO
28. MANĜI
29. TRINKI
30. PANO
31. ORDINARA SEĜO
32. AKVO-GLASO
33. SON-BENDO: KASEDO
34. STAR-LAMPO
35. ANTENO



56 - LA KUIREJO

1. GLACI-ŜRANKO = FRIDUJO
2. LAVUJO: LAV-ŜTONO
3. BAKUJO
4. MUR-ŜRANKO
5. TABLO-ŜRANKO
6. KRANO
7. TELER-RAKO
8. BOL-KRUĈO
9. KUIR-POTO = KASEROLO
10. FRITILO = PATO
11. GLASO
12. AKVO-KRUĈO
13. TELERO
14. TASO KAJ SUB-TASO
15. SPICUJARO
16. BOVLOJ
17. TELER-TUKO
18. KUIR-FORNO = FORNELO
19. FUMO
20. FUM-SUĈILO
21. LIKVIGILO
22. MALFERMILO: SKATOL-MALFERMILO, BOTEL-MALFERMILO
23. LAD-SKATOLO: MALFERMITA
24. MANĜILOJ: a. FORKO; b. TRANĈILO; c. KULERO
25. KORK-TIRILO
26. KORKO
27. KRIBRILO
28. KIRLILO: ELEKTRA
29. RASPILO
30. RUL-KNEDILO
31. BIER-GLASO = BIER-KRUĈETO
32. FUNELO
33. PESILO
34. ŜRANKO: SUB-LAVUJA
35. TABURETO
36. RUBUJO = BALAAĴUJO
37. BOTELO: ĈAMPANA
38. FROSTIGILO = KONGELUJO: APARTA

57 - LA DORMO-ĈAMBRO

1. PLAFONO
2. LITO
3. LIT-TUKO
4. KAP-KUSENO
5. LAMPO: TABLA
6. LAMP-ŜIRMILO
7. VEK-HORLOĜO
8. LIT-KOVRILO
9. LULILO
10. LIT-PIEDO
11. TAPIŜO
12. NOKTO-VAZO = URINUJO, PIS-POTO
13. LUDILOJ
14. URSETO: EL PLUŜO
15. PILKO
16. TINTILO
17. PUPO
18. PORTRETO
19. SPEGULO
20. TIR-KESTARO = KOMODO
21. TIR-KESTO
22. VESTAĴOJ: ĈEMIZOJ
23. TIRILO
24. SUĈ-BOTELO
25. CICUMO
26. PARFUM-BOTELOJ
27. KUL-VUALO
28. BALANC-ARKO
29. PLANKO
30. VESTO-ŜRANKO

58 - LA BANEJO

1. BASKUL-FENESTRO
2. DUŜO
3. BAN-KUVO
4. LAV-TABLO
5. SPEGULO
6. BAN-TUKO
7. KRAN-FERMILOJ
8. KRANO
9. POST-RAZA AKVO
   = POST RAZA LOCIO
10. SAP-NIĈETO KAJ SAPO
11. ŜAŬMO
12. SPONGO
13. KUFO
14. TALKO-SKATOLO
15. LAMPO: FLUORESKA
16. MUR-ŜRANKO
17. RAZILO
18. PAPERO: HIGIENA
    = NECESEJA, KLOZETA
19. FOR-PELILO = FOR-ŜPRUCIGILO
20. PELVO = VAZO: HIGIENA
    = NECESEJA, KLOZETA
21. MATO: SORBA
22. KAHELOJ
23. DENTO-BROSO
24. NEGLIĜO: BAN-MANTELO
25. PIĴAMO: JAKO + PANTALONO
26. DENTO-PASTO
27. NOKTO-ĈEMIZO
28. HAR-SEKIGILO
29. HAR-BROSO
30. BILDO: SPEGULATA
31. PEND-RINGO



59 - FRONTA PARTO (FASADO KAJ PLIAJ DETALOJ)

1. TEGMENTO
2. TELEVIDA ANTENO
3. KAMEN-TUBO
4. FULMO-ŜIRMILO
5. LUM-APERTURO = LUKO
6. SUB-TEGMENTO = MANSARDO
7. DE-FLUILO
8. PLUV-TUBO
9. FASADO
10. MURO EL BRIKOJ
11. BALKONO
12. SUN-ŜIRMILO
    = PERSIENO: LEVEBLA
13. BASKUL-FENESTRO
14. ŜUTROJ
15. VERANDO: NE FERMITA
16. ĜARDENO
17. DOM-INTERNO
18. VESTIBLO KAJ ŜTUPARO
19. SUPRA ETAĜO
20. TER-ETAĜO
21. KELO
22. (VIN)KELO
23. KOLONOJ
24. KAMENO
25. MARKEZO
26. GARAĜO: NE FERMITA
27. LUM-FOSTO
28. PORDEGO: EKSTERA
29. MURO
30. BARILO: FERA KRADO
31. AKVO-PUTO
32. KABLOJ: ELEKTRAJ

a. FULMO
b. VIZITANTO
c. SONORILO
ĉ. LETER-KESTO
d. ELEKTRO-MEZURILO
e. SAKO DA KARBO
f. BRUL-LIGNO
g. SITELO
ĝ. ŜNUR-TIRILO: KRANKO
h. BOTEL-RAKO
i. ĜARDENILOJ, de maldekstre:
   ŜOVELILO, ŜPATO, RASTILO

60 - LUDOJ KAJ SPORTOJ (1)

1. (STANG)IRILOJ = STILŽOJ
2. SKUTILO = TROTILO
3. BILBOKO
4. RUL-ŜUOJ
5. TABLO-TENISO
6. PIED-PILK(AD)O = FUTBALO
7. (FLUG)DRAKO = KAJTO
8. TURBO
9. HUL-RINGO = TALI-RINGO
10. GLIT-ŜUOJ
11. LIGNA ĈEVALETO
12. GLOBETOJ: POR GLOBET-LUDO

a. DIREKTILO
b. RADO: ANTAŬA
c. APOGILO
ĉ. ŜNURETO
d. GLOBO: TRA-BORITA
e. KAPTILO
f. BATILO: TABLO-TENISA
g. RETO
ĝ. PILKO: CELULOIDA
h. PIED-BATO = ŜOTO
ĥ. VOSTO: FLUG-DRAKA
i. HAR-LIGO KAJ BANTO
j. GLAVO: LIGNA
ĵ. BRIDO
k. KNABO: SUR-GENUE
l. TRI-ANGULO: POR GLOBET-LUDO



61 - LUDOJ KAJ SPORTOJ (2)

ATLETISMO (1-4)
1. SALT(AD)O KUN STANGO
2. SALT(AD)O EN LONGO
3. EBENA (VET)KURADO
4. (VET)KURADO KUN BAROJ
5. SKERM(AD)O
6. GIMNASTIKO
7. (VET)REMADO
8. KORBO-PILK(AD)O = BASKETBALO
9. LUKTADO: KARATEO
10. (VET)NAĜADO
11. RAJD-SALT(AD)O

a. STANGO
b. BARO
c. RAPIRO
ĉ. MASKO: SKERMISTA
d. KIMONO: LUKTISTA
e. BOATO: DU-REMISTA
f. REMILO
g. KORBO



62 - LUDOJ KAJ SPORTOJ (3)

1. GOLF-LUDO
2. RULETO
3. TENISO
4. FIŜ(KAPT)ADO
5. ĈEVAL(A VET)KURADO
   = VET-RAJDADO
6. POLOO = MALEO-PILK(AD)O
7. BAZ-PILK(AD)O = BASBALO
8. LIBERA ŜVEBO
   = LIBERA GLISADO

a. GOLF-BASTONO
b. GLOBETO
c. FAKOJ DE TURN-DISKO
ĉ. LUD-MARKOJ = ĴETONOJ
d. VET(LUD)ANTOJ
e. MON-LUDEJA OFICISTO:
   RULETISTO = KRUPIERO
f. MALEO = (POLOA) MARTELO
g. FIŜ-KANO
ĝ. TIR-PULIO
h. FADENO
ĥ. FIŜ-HOKO
i. SELO
j. BRIDO
ĵ. ŜVEBILO = GLIS-FLUGILO
k. BATILOJ: TENISA (= RAKEDO)
   KAJ BAZ-PILKA
l. PILKO

63 - LUDOJ KAJ SPORTOJ (4)

1. ŜAKO(J) = ŜAK-LUDO
2. ŜAK-TABULO
3. **ŜAK-PECOJ = FIGUROJ (4-9)**
4. SOLDATO = PEONO
5. KURIERO
6. ĈEVALO
7. TURO
8. DAMO
9. REĜO
10. DISKOJ POR DAM-LUDO
11. LUD-KARTOJ

KARTOJ EL
KVAR EMBLEMOJ (12-15):

12. BUBO = FANTO: KAROA
13. DAMO: KERA
14. REĜO: PIKA
15. ASO: TREFA
16. KROM-KARTO
    = ŜERCISTO, ĴOKERO
17. ĴET-KUBOJ
18. KAP-ROMPAĴO = PUZLO
19. DOMENO
20. PIED-PILKO = FUTBALO: TABLA

a. GOLEJO
b. TENILO: DE ŜOTILO
c. DOMEN-PECO = DOMEN-BRIKO
ĉ. PUZLO-PECO



64 - LUDOJ KAJ SPORTOJ (5)

1. BOKSADO
2. SKIADO
3. HOKEO
